GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDÈNCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis : BARCELONA : Telèfon 82215

BIBLIOTECA DE CATALUNYA - BARCELONA

COMUNICAT DE PREMSA

ESPERANTO - ELDONO. Nº. 27. Barcelona, 2/XII, 1937.

LA MILITA SITUACIO KAJ LA VENONTA OFENSIVO.



Jam de kelkaj semajnoj oni povas legi en la eksterlanda gazetaro la alarmajn komunikojn pri la granda ofensivo, kiun preparas Franco. Tiuj komunikoj estas ofte akompanataj kun longa vico de mensogoj kaj propagando, kaj povas servi nur al la konkludo, ke spite la tutan ŝajnon, ne estas ankoraŭ certa, ĉu liaj militaj fortoj, kiujn li disponigas, sufiĉas atingi la deziratan venkon.

Laŭ nuna situacio, laŭ la milita vidpunkto, ne aspektas tiel, kiel diskonigas la faŝista radio-stacio kaj faŝista gazetaro. Estas sendube, ke Franco preparas de longa tempo avizitan ofensivon post la falo de Gijon. Unu monato pasis, de tempo kiam en Saragosso per elparolita parolado estis deklarita, ke la rekonkero de Aragono estas nur demando de kelkaj tagoj, kaj la detoniĝo de kanonoj, kiu estas bone aŭdebla en la Aragona ĉefurbo, estos por ĉiam silentigita.

Post tio jam pasis 4 semajnoj. Pasis jam Novembro, tempo en kiu la militaj operacioj je granda skalo povas esti faritaj, sed nun jam estas Decembro kaj la malvarmo kaj la neĝo en la montoj neebligas jam tiuj operacioj. Se la faŝistoj vere estas tiel fortaj, kiel ili sin prezentas, kaj kiam estos tiel facile, ekvenki la finbatalon, kial do ili perdis post la falo de Gijon tiom da multekosta tempo ? Sen komenci iun ajn operacion, la faŝistoj laŭ perfekta Goebbels'a sistemo jam ekfanfaronis kaj mensogis laŭ pove. Estas ankaŭ eble, ke Franco volis tiun tempon elprofiti atendante al nova helpo de Germanujo kaj Italujo ?

En neniu fronto, nek en Orienta, nek Centra, nek en Suda la invaduloj kaj la ribeluloj havas la grandajn facilaĵojn kiel ili havis en Nordo. En la proksimaj bataloj la kvanto de soldatoj povas esti en ambaŭ flankoj egalaj. Franco disponas pri gravaj kvantoj de militmaterialo, sed la respublikanoj ankaŭ ne preterlasis la tempon senprofite kaj posedas hodiaŭ ankaŭ ĉion necesan. La rebelula aviado povas laŭ kvanto esti pli granda, sed pro tio la respublikana morale kaj spirite multe superigas la faŝistan. Kaj cetere la respublikana artilerio scipovas ankaŭ dece respondi al la faŝistaj kanonoj.

Ankoraŭ la grava faktoro por prijuĝi la situacion: Konstante pli forta kontraŭstaro en la ariergardo de Franco, kvankam la faŝista preso prisilentas tion, sed tamen faktoro de grandioza valoro, kion atestas centoj da forkurintoj el ĉiuj sektoroj de la fronto.

La respublikana armeo estas disciplinita kaj bone organizita, forta en

homoj kaj militmaterialo; krome la moralo de respublikanoj estas altvalora, ĉar ili scias, ke ili batalas por la libereco de Hispanujo, subtenataj de la propra ariergardo, kiu konas nur unu celon; venki la faŝismon. Tiel armita, la respublikana armeo atendas trankvile la ofensivon de Franco - kiu renkontos la kontraŭstaron, kaj spite la helpon de germano-itala faŝismo - devas malvenki.

LA KREO DE NOVAJ KURSOJ POR LA MILITA EDUKADO EN KATALUNUJO.

La ĝenerala sekretario de Komitato de Militista Edukado en Katalunujo, esprimis sian kontentecon pri la kunlaboro de Ministerjo de Defendo por kreado de milita edukado por la junularo.

En Katalunujo ekzistas nun 80 lokoj por la simila edukado. En Pins de Valles ekzistas kampo de 2000 kursanojkaj aliaj similaj kampoj estas en konstruo. Tiuj kampoj ebligos al 40.000 junuloj doni la militan edukon kaj instrukcion. Tiuj aranĝoj elvokis grandan entuziasmon ĉa la Kataluna Junularo, ĉar rezultis, ke 99 % de rekrutoj konsistas el libervoluloj. Katalunujo, kiu havas nun du - cent mil virojn en la fronto povas nun ankaŭ krei novan rezervon de junuloj inter 18 kaj 19 jaraĝaj.

FRANCO TROMPAS BASKAJN INFANOJN .

El 250 Baskaj rifuĝintaj infanoj, kiuj laŭ deziro de Franco kaj altrudita postulo de ĝiaj gepatroj, estis resenditaj el Anglujo al San Sabastian, estis nur 200 akceptitaj de siaj familianoj. Estis klare rimarkeble , ke multaj familioj deziris, ke la infanoj restu en Anglujo. Kvindek infanoj, kies reveno Al Baskolando, estis laŭ ŝajne postulate de iliaj familioj, estis metitaj en iaj edukdomoj, ĉer iliaj gepatroj estis mortitaj aŭ rifuĝitaj en la respublika teritorio.

KATALUNA REGISTARO OFICIALIGAS ESPERANTON.

La 28-an de Novembro pasinta, okazis en la Casal de la Cultura en Barcelono la ĝenerala kunveno de Kontraŭfaŝista Esperanto Komitato de Katalunujo. La ĵurnalkomunikoj kaj radioinformoj alvarbis la grandnombran ĉeestantaron de esperantistoj el tuta Katalunujo. Kunvenon prezidis K-do Domingo Masachs, kiu en sia alparolo klarigis la celon de tiu kunveno, sciigante ke la Kontraŭfaŝista Esperanto Komitato de Katalunujo ne estos plu Komitato, kiel ĝi estis ĝis nun konsistanta el reprezentantoj de diversaj katalunaj Esperanto societoj, sed memstara Asocio kun propra statuto, kun individuaj membroj kaj sekcioj en diversaj lokoj en Katalunujo. Kontraŭfaŝista Esperanto Komitato de Katalunujo (K.E.K.K.) estos kultursocia organizaĵo ekzistanta sub aŭspicioj de Comissariat de Propaganda de Generalitat de Katalunujo, krome ricevos la oficialan rekonon de Generalitat de Katalunujo, ricevos la Esperanto -Domon, kie esperantistoj povos kunveni,starigi bibliotekon, gvidi kursojn ktp.. Ĉiu ano de K.E.K.K. ricevos membrokarton kaj senpage la presitan Esperanto gazeton, kiu baldaŭ aperos.

Poste parolis K-do Jozefo Anglada, pledante por la nova organizaĵo kaj dankante al la Kataluna Registaro por la granda utiligo de Esperanto. K-do Alberto Diaz el Bilbao transdonis la saluton de Baskaj esperantistoj kaj prezentis per elokventaj vortoj la faŝistan barbarecon en Baskolando instigante la

ĉeestantojn por unuiĝi kaj komune batali kontraŭ la kruela faŝismo. K-do O. Kupperman endikis la novan programon de Komitato por la insista kaj pli forta propagando de Esperanto kaj kontraŭ faŝismo kaj komentariis la statuton laŭ punktoj.-Esperanto envenis nun en nova periodo en la alia 50 jaroj. Ĝis nun, en la pasintaj 50 jaroj esperantistoj petis kaj petegis siajn registarojn por bonvole esprimi iun simpation por Esperanto, ofte kun malsukceso. Nun unua fojo en la historio de Esperanto iu Registaro memvole oficialigas Esperanton kaj donas al ĝi ĉiujn facilaĵojn. Tiu tago estas historia tago ne nur por Esperanto movado en Hispanujo, sed por la tuta mondo. Hispana revolucio estas decida por la estonteco de Esperanto kaj ĝia disvolvo. Hispana Revolucio donis potencan puŝon antaŭen al Esperanto kaj certe Katalunujo estos la unua lando en la mondo, kie Esperanto estos enkondukata kiel deviga fako. Tiuj vortoj estis laŭte aplaŭditaj.

Post malmultaj diskutoj , la kunveno unuanime akceptis la statuton kaj laŭ la propono de la lasta parolinto oni akceptis du rezolucioĵn por sendi telegramon al Kataluna Prezidanto Lluis Companys kaj al la »Popola Fronto» en Valencio.

La Ĉefestraro de Kontraŭfaŝista Esperanto Komitato de Katalunujo konsistas el Prezidanto Samuel Roca i Rodo, Viceprezidanto Domingo Masachs, Ĝenerala Sekretario Ovadja Kupperman, Sekretario Alberto Diaz, Kasisto Jose M. Coll.

La teksto de telegramo sendita al Prezidanto Lluis Companys:

PREZIDANTO DE KATALUNUJO LLUIS COMPANYS, BARCELONA.

LA UNUA ĜENERALA KUNVENO DE KONTRAŬFAŜISTA ESPERANTO KOMITATO DE KATALUNUJO VOLAS PER ĈI TIO ESPRIMI AL LIA EKSCELENCO SIAN FIDELON KAJ KUNLIGECON AL KATALUNUJO KAJ KONTRAŬFAŜISTA AFERO. KATALUNAJ ESPERANTISTOJ ESTAS ĈIAM PRETAJ PLENUMI LA ORDONOJN DE SIA PREZIDANTO, PREZIDANTO DE ĈIUJ KATALUNOJ.

VIVU KATALUNUJO ! VIVU RESPUBLIKO !

.....

Telegramo sendita al »Popola Fronto», Valencio:

POPOLA FRONTO, CALLE DEL MAR 25, VALENCIO.

LA UNUA ĜENERALA KUNVENO DE KONTRAŬFAŜISTA ESPERANTO KOMITATO DE KATALUNUJOVOLAS PER ĈI TIO ESPRIMI AL VI LA GRANDAN ADMIRON KAJ ESTIMON PRO LA ALTA CELO KIUN VI EFEKTIVIGAS POR LA RESPUBLIKO KAJ ESPERANTO. LA KUNVENO APROBAS VIAN SINTENON EN LA KONGRESOJ DE SAT KAJ IPE KAJ DANKAS PRO LA BONA REPREZENTADO.

VIVU POPOLA FRONTO ! VIVU ESPERANTO !

.....

INTERVJUO KUN LEON NICOLLE.

Revene de sia vojaĝo al Madrido, Mr. Leon Nicolle restis kelkajn horojn en Barcelono kaj vizitis min. Mr. Nicolle estas bona amiko de Kontraŭfaŝista Hispanujo kaj granda admiranto de la Kataluna popolo.

Ni petis de li impreson pri la vojaĝo, kiun li ĵus faris, kaj li respondis al ni :

Mi portas el tiu ĉi vojaĝo la plej bonajn impresojn. Kiam mi venis tien ĉi mi faris tion kun la certeco, ke la venko estos por la Respubliko; certecon, kiu, pli bone dirite, estis antaŭsento; viva deziro. Nun tiu certeco, tiu konvinko estas pravigita kaj ĝi estas bazita sur tio, kion mi vidis la lastajn tagojn, antaŭ ĉio en Madrido. Madrido estas urbo, kiu donas la impreson de popolo sterĉe unuigita kun la Armeo, de popolo, kiu estas kvazaŭ daŭrigo de tiu ĉi armeo mem, kiel se armeo kaj popolo formos granitan blokon.

Mi vizitis la sektoron de la Casa de Campo kaj mi povis konstati la disciplinon, kiu regas inter la soldatoj kaj la oficiroj, ne fera disciplino, sed disciplino memtrudita de unuj kaj aliaj, ĉar ili scias, ke per tio ĉi ili kon-

tribuas al la atingo de la venko, disciplino, kiu estas,nova afero, kiu certe ne estas vidata en iu Armeo pli bone, eĉ ne simile. Mi konstatis la kulturan klopodon, kiun oni faris por la Armeo. Tiuj lernejaj klasoj estis kreitaj apud la tranĉeoj, kie tiuj, kiuj ne havis okazon iri al la lernejo, lernas tion, kion oni tie estus al ili instrinta. Mi vidis superajn kursojn de Belartoj, kaj mi vidis la soldatojn skulptantaj, pentrantaj kaj desegnantaj. Mi vidis ankaŭ la tranĉeojn tuŝantajn la loĝejojn de la batalantoj, kie oni ludas teatraĵojn kaj la soldatoj trovas distran angulon kaj kie oni donas al ili konsilojn, por ke ili ne malŝparu sian monon. Oni stimulas ilin por ke ili legu kaj por ke ili respektu siajn kamaradojn. Mi aŭdis kun plezuro la vortojn de la Brigada Komandanto, kiam li diris al mi, ke ili estas certaj pri sia venko kaj ke ili havas Armeon, kiun Franco neniam sukcesos havi.

- Ju pli da italoj kaj germanoj batalos kun Franco, des malpli ili estos por batali kontraŭ la kontraŭfaŝistoj de la aliaj landoj, diris al mi la majoro, malnova oficiro de la Armeo.

Mi vidis ankaŭ la grandan kulturan klopodon faratan de la Respubliko. Mi vizitis la Prado'n kaj mi vidis la grandajn laborojn realigitajn por por la savo de la tuta arta trezoro el Hispanujo, tiuj 16.000 pentraĵoj, kiujn oni savis, tiuj "Grekoj" pentraĵoj de la fama artisto nomata la "Greko", kiujn oni trovis difektitaj en privataj domoj kaj kiujn oni nun rebonigas; mi trovis ĉion ĉi admirinda en la momentoj, kiujn Hispanujo travivas, en ĉi tiuj momentoj de gravaj zorgoj, des pli post la maniero kiel la ĵurnalaro traktis la respublikanojn, kvazaŭ ili estus sovaĝuloj, homoj sen kulturo, kiam estas ĝuste tute kontraŭe.

En Madrido, kiam mi pretiĝis por foriri, mi havis la okazon paroli kelkajn momentojn kun protestanta pastro, kiu informis min pri la granda sentemeco de via popolo kaj diris al mi, ke li konis multajn Marksistojn kaj komunistojn, kiuj montris, ke ili havas Dion en la koro. Tiu pastro diris al mi: "Kiu ajn laboristo, analfabeta proleto el Madrido, havas pli da homa kompreno, ol Eden aŭ Chamberlain."

Mi vizitis la detruitajn kvartalojn de Madrido, mi pasigis unu tutan posttagmezon kaj mi povis rimarki la mortan silenton, kiu regas en tiuj lokoj kaj lasas al vi profundan impreson. Mi povis indigni kaj mi emociigis. Ĉiel ne estis necese tiom da barbareco, ĉar ili ne povis pasi.

Revene de Madrido mi haltis en la vilaĝeto de la orienta marbordo kaj mi kunvivis tiujn horojn kun elementoj de la Internaciaj Brigadoj. Mi parolis kun kvar Svisaj civitanoj, kiuj estas tie kaj nur donis laŭdojn pro la maniero kiel ili estis traktitaj en ĉiu momento kaj pro la belega organizado de via sanigistaro. Mi trovis inter tiuj homoj belegan spiritstaton kaj gajecon. En ĉiuj lokoj oni rimarkas deziron por plialtigo de la homa nivelo, en lando, kiu estas en plena kreado kaj kiun oni vidas kapabla je io nova kaj neniam vidita. Mi rimarkis la senton de egaleco, ĉe la popolokian oni povas vidi nur en nia lando.

Kaj kion mi diros pri Barcelono ? Baecelono donas la impreson de urbo ekstreme forta kaj de grandegaj rimedoj; oni vidas en ĝi firman volon batali kun la Respubliko kontraŭ la faŝismo. Oni vidas en via tero streĉan kunlaboradon kun la Registaro de la Respubliko, kio konfirmas ankoraŭ unu fojon la senton de la lojaleco, kiun vi, la katalunoj, havas.

Mi volus fine, ke vi prezentu mian dankecon al la kamaradoj el Madrido, kiuj donis al mi ĉiajn facilecojn por plenumi nian taskon kaj mi volas, ke miaj lastaj vortoj estu la sekvantaj:

La venko eble ne estos rapida, sed ĝi estas certa. Jen estas mia plej profunda konvinko.

MAJORO ATLEE EN HISPANUJO.

Nuntempe ĉeestas en Hispanujo la granda amiko de Hispana popolo Majoro Atlee, ĉefo de Labour Paty en Anglujo. Majoro Atlee vizitis nian landon kiel gasto de la Registaro.

Nº. 27.

KAPITANO RUDOLFO ROBLES

UNU EL LA GLORA RESPUBLIKANA AVIADO.

La tutmonda preso raportis multfoje pri la heroeco de la respublikana aviado kaj ĝia supereco super la faŝista. Oftfoje oni dediĉis al tio grandajn artikolojn en la gazetaro kaj multajn atentojn de la publiko.

Estas konata fakto, ke la respublikana aviado, kvankam en la kvanto da aparatoj estas pli malgranda, sed tamen pli kuraĝa kaj pli supera en la aerbataloj.


La faŝistaj pilotoj neniam akceptas aerbatalon kun la respublikanoj, ĉiam ili forkuras malkuraĝege kaj dediĉas sin nur al la bombardado kaj detruo de pacaj sendefendaj vilaĝoj kaj urboj en la ariergardo.

Estas memkompreneble, ke Franco -pilotoj estas ĉiuj germanoj kaj italoj, kiuj ne venis Hispanujon propravole kaj pro tio preferas ne akcepti iun ajn batalon por eventuale ne esti kune kun siaj multekostaj maŝinoj dispecigitaj kaj transformitaj en bruliganta kaj senforma amaso.

Kontraŭe al respublikanaj pilotoj, tiuj estas ĉiuj hispanaj, krom kelkaj eksterlandaj volentuloj, ĉiuj junaj pilotoj, entuziasmaj kaj indifurentaj al sia vivo, ĉar ili konscias, ke ili defendas sian landon, siajn patrinojn kaj sian popolon. La abnigacio de la hispana piloto estas karaktera eco de la forta volo kaj firma deziro de tuta hispana popolo por la venko super la faŝismo kaj eksterlanda invado.

Antaŭ ni staras unu el tiuj pilotoj, de la glora respublikana aviado, Kapitano Rudolfo Robles. Li estas el Sevilla, lia nomo estiĝis jam fama pro lia respublikaneco kaj lia heroeco kiel piloto de la Respubliko. Juna forta viro

.....



KAPITANO RUDOLFO ROBLES, UNU EL LA GLORA RESPUBLIKANA AVIADO.

kun belaj profundaj okuloj kaj energioesprima vizaĝo. La nigraj kun iom grizaj haroj montras lian riĉan pasintecon. Rudolfo Robles, havas bonan memoron kaj scias flue rakonti siajn aventurojn. En jaro 1932 li pafis el pistolo al sia ĉefo majoro, Filipe Acedo, kiu klopodis instigi la soldatojn al la faŝista ribelo. Kvankam ĉiuj soldatoj estis favoraj al la sinteno de Robles, li tamen estis komdamnita per Milittribunalo al ses jaroj da malliberejo. Akuzis lin du faŝistaj oficiroj; generalo Julio Mena kaj kolonelo Fernandez Buriel, kiu estis fusiligita pasintan jaron. Kvar jarojn li estis en la malliberejo "Castillo de Santa Catarina" en Cadiz kaj poste trapasis diversajn aliajn malliberejojn ĝis kiam li estis liberigita pere amnestio dank al la Popolfronta Registaro.

En la malliberejo Rudolfo Robles konatiĝis pli profunde kun la liberecaj ideoj kaj el la malliberejo li sciis publikigi flamajn artikolojn por la Respubliko kaj kontraŭ la subpremantojn de sia popolo.

Kiam en Julio 1936 eksplodis la faŝista ribelo, Rudolfo Robles troviĝis en Barcelono kaj de la eksplodo ĝis nun li partoprenis aktive en la batalon kontraŭ ribeluloj. Li estis la unua respublikana piloto , kiu en antikva flugmaŝino bombardis la faŝistajn poziciojn kaj atakis la modernajn "Heinkel" kaj "Caproni" - flugmaŝinoj. Kune kun la Kolonelo Alfredo Reyes li bombardis la ribelulajn kazernojn "Quartel de Icaria" kaj "De Tarrasanas" en Barcelono. Poste li partoprenis en la unuaj atakoj al Huesca kaj per sia antikvmodela flugmaŝino multege apogis kaj instigis la milicanojn. Baldaŭ li estis sendita al Lerida kaj de Lerida al Alcaniz. En Aragona fronto li travivis gravan okcidenton kiam en unu aerbatalo la faŝista kuglo traboris lian benzinrezervoaron kiem Robles troviĝis ĝuste sur la teritorio malamika. Nur lia kapableco kaj forta volo savis lin kaj lian maŝinon antaŭ la certa morto kaj detruo. Kun la naztuko li haltigis la forfluon de la benzino kaj per akrobataj manovroj atingis la respublikanan terenon.

En la duono de Septembro de pasinta jaro li ricevis la ordonon flugi al Bilbao kaj tien okazis io terura, diris Robles. Io simila povas okazi nur dum la civilmilito, dum faŝistaj ribeloj - la frukto de faŝista ideologio. Rudolfo Robles ricevis ordonon bombardi la ribelulan militŝipon, kies unu el la oficiroj estis lia frato. Kontraŭaviadilbaterioj de la ŝipo pafis insiste supren, kiam Robles metis bombojn sur la ŝipon, kie troviĝis sia frato. Tiu abomena epizodo de la hispana milito estas la rezulto de la faŝista demoralizado - kiam unu frato devas murdi la alian pro la gloro al Hitler Mussolini kaj Franco.

La sciigo pri la morto de sia patrino kaj iom poste la morto de sia patro devigis Rudolfon reveni al Barcelona. Ankoraŭ li partoprenis en la ofensivo al Huesca en kiu mortis heroe generalo Lucas kaj nun li estas ĉefo de aviadkampo de Gerona kaj ĝojas pro la simpatio kaj estimo de siaj multaj amikoj kaj soldatoj el la glora respublikana aviado.

AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ.

Comissariat de Propaganda de Generalitat de Catalunya volas donaci al la Kataluna Esperantistaro belan ilustritan gazeton ĉiu monate, dediĉita tute al la propagando de Esperanto. Sed evedentiĝis, ke mankas en Hispanujo la papero por efektevigi la belan permeson por esperantistoj de la Kataluna Registaro. Ankaŭ mankas la necesajn eksterlandajn divizojn por aĉeti la necesan paperon en eksterlando.

Por ne preterlasi tiun okazon por propagandi Esperanton per la propra organo oficialigita de la Registaro, Katalunaj Esperantistoj turnas sin kun la peto al ĉiuj samideanoj, se estas eble ricevi de ili la necesan paperon. Kun la espero, ke ankaŭ ĉi tiun fojon la Esperantistaro esprimos al ni la samideanan solidarecon kaj ebligos al ni la eldonon de Esperanto gazeto.

Rilate tiun peton oni povas turni sin al la Comissariat de Propaganda de Generalitat de Catalunya, Esperanto - Fako, Avinguda 14 d´Abril 442, Barcelona.